

Bertolt Brecht,  
La tajloro de Ulm

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

“Episkop’, mi flugos”,  
diris tajloro al Moŝt’.  
“Venu, por moment’.”  
Kaj li grimpis kun flugiloj  
en aplaŭdo kaj jubiloj,  
ĝis la granda granda kirktegment’.  
Lia Moŝt’ nur diris:  
“Mensogoj, kiel ĉiam.  
Hom’ birdo ne estas.  
Homoj flugos neniam.”  
La episkopo plu iris.

“La tajloro jam ne vivas”,  
diris la homoj ĉe l’ Moŝt’:  
“Trois la aŭdac’.  
La flugiloj frakasiĝis,  
la tajloro surnaziĝis  
sur la dura dura kirkoplac’.”  
Sonoriloj sonis.  
“Mensogoj, kiel ĉiam!  
Hom’ birdo ne estas.  
Homoj flugos neniam”,  
la episkopo admonis.

*Traduko de la Germana poemo “Der Schneider von Ulm” de BERTOLT BRECHT (\*1898 – †1956) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-1084-2183 (2014-08-06 13:31:54)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://cezartradukoj.blogspot.de/>.*